

200  
STARTO

**El la enhavo:**

200a Starto  
ThDr. Rudolf Horský mortis  
UK Zagreb  
100 jaroj de EK Brno  
Infandeseĝnoj  
D. Blanke jubileas  
Liĥnidoj  
Karolo Piĉ kaj OSIEK  
Baltaj aranĝoj

3  
2001

**ORGANO DE ĈEĤA ESPERANTO-ASOCIO**



**Vilao Esperanto  
en banloko  
LUHAČOVICE**

## ☆ Starto ☆

organo de Ĉeĥa Esperanto-Asocio, 4-foje jare. Abono 9 eŭroj (+ 2 eŭroj aerpoŝte),  
**rete Starto:** starto@clavis.cz,

www.clavis.cz/starto, **rete ĈEA:**  
cea.polnický@quick.cz (sekretario)  
podhradska@volny.cz (prezidanto)  
www.kuk.cz/cea/

**Komercaj anoncoj:** 25 Kč por unu linio. 800 Kč por kvaronpaĝo, 1500 Kč por duonpaĝo, 2500 Kč por tuta paĝo. Duobla reklamo 15% rabato, triobla reklamo 30% rabato. Movadaj anoncoj duonpreze.

**Membrokotizoj:** A 250 Kč, B 150 Kč, D 70 Kč, E 70 Kč, F 5000 Kč, G 130 Kč (Starto), N 25 Kč, eksterlandanoj 12 eŭroj, enskribo 20 Kč.

**Korespondaj kursoj:** 500 Kč komencantoj, 500 Kč progresintoj. Aliĝoj: Jana Melichárková, Polní 936, 696 02 Ratíškovice, melicharkova@quick.cz

**Libroservo:** Zdeněk Pluhař, Lamačova 658/6, 15200 Praha, tel. 02/51817732, m.pluharova@worldonline.cz

**Sekcioj de ĈEA:** junulara, skolta, pedagogia, katolika, kristana, blindula, medicina, fervojista, ŝakista, SAT-amikara, de esperantaj-kolektantoj, pri informatiko

**Komisionoj de ĈEA:** ekzamena, gazetara-informa

**Asocia adreso:** Ĉeĥa Esperanto-Asocio, c/o Pavel Polnický, Lesní 150/VI, 290 01 Poděbrady, tel. 0324/615651, cea.polnický@quick.cz

**IĈO de ĈEA:** 00 44 30 34

**Banko-konto de ĈEA:**

3330-021/0100, Komerční banka Poděbrady

ISSN 1212-009X

## Komitato de ĈEA:

**Prezidantino:** Věra Podhradská, Poříčej I, 603 00 Brno, tel. 05/4323 3047, podhradska@volny.cz (eksteraj rilatoj, honoraj membroj, E-muzeo)

**Vicprezidanto:** Petr Chrdle, Anglická 878, 252 29 Dobřichovice, tel. 02/9912201, fakso 02/9912126 chrdle@kava-pech.cz, (eldonado, UEA, subvencioj)

**Vicprezidanto:** Jan Řepa, Na Valše 250, 384 11 Netolice (sekcioj), e-mail: repasyn@iol.cz, tel. 0338/324 287, 0602 800214

**Sekretario:** Pavel Polnický, Lesní 150/VI, 290 01 Poděbrady, tel./fax.. 0324/615651, cea.polnický@quick.cz (kontado, membrobazo)

**Kasisto:** Jindřich Ondráček, Bubenská 17, 170 00 Praha (konferencioj, seminarioj), tel. 02/879386

**Komitatano:** Zdeněk Heiser, Na Nábřeží 45/25, 736 01 Havířov-Město, tel. 069/6815253 (EK, kulturo)

**Komitatano-ĉefdelegito de UEA:** Lucie Karešová, Tylova 1262, 508 01 Hořice v Podkrkonoší (protokolado, junulara sekcio)

**Kontrolgrupo de ĈEA:** Josef Hron, Bohdanečská 68, 530 09 Pardubice, Libuše Krejčí, Školní 693, 789 61 Bludov

**Redaktoro de Starto:** Miroslav Malovec, Bosonožská 15/10, 625 00 Brno, tel. 05/4724 0690 (nesignitaj artikoloj estas liaj), starto@clavis.cz

**Lingva kontrolo:** Miloslav Pastrňák  
**Esperanto-muzeo:** Jiří Pištora, Městské muzeum, Staré nám. 78, 560 02 Česká Třebová

**Abonoj de gazetoj:** Vladislav Hasala, A. Dvořáka 1, 696 62 Strážnice, tel. 0631/332 278, fakso 0631/332 507, vlada\_hasala@iol.cz

## Okaze de Starto - jubileo

La titolpaĝo de nia organo alrememorigas al ĉiuj legantoj, ke tiu ĉi numero estas la 200-a, do iel jubilea. Por gazeto aperanta tage, semajne, eĉ monate tiu ĉi nombro ne estas tro mirinda, sed por Starto, kies aperperiodo estis parte neregula, parte kelkmonata, prezentas ducent numeroj tridekunujaran vivodaŭron. Per ili fariĝas la organo de Ĉeĥa Esperanto-Asocio plej longe aperanta Esperanto-gazeto en la tuta historio de la enlanda Esperanto-movado.

Tiu ĉi fakto meritas ĉe okazo de la numer-jubileo iometan rerigardon des pli, ke multaj legantoj havas pri naskiĝo kaj evoluo de Starto nur nebulajn aŭ tute neniajn sci-ojn.

Por kompreni la ĉefan ideon de - en la jaro 1968 nove fondita - Esperanto-gazeto oni por momento revenu en historion.

Komence de kvindekaj jaroj - jam en la pasinta jarcento - sub preteksto, ke Esperanto-movado estas kosmopolita kaj ne respektas proletaran internaciismon - estis devige malfondita Esperanto-Asocio de Ĉeĥoslovakio. Kun ĝi, kompreneble, ĉesis ekzisti ĝia asocia gazeto "Esperan-

tista". La movado en Ĉeĥoslovakio displitiĝis en unuopajn rondetojn kaj klubojn, kiuj agadis en sindikatoj aŭ klerigaj komunumoj. El inter aktivaj esperantistoj spontane kreiĝis Tutŝtata Konsulta Komitato Esperantista por solvi diversajn komunajn problemojn, kiu ja estis nur duone legala. Tia ĉi desuba iniciato ne estis ŝatata de ŝtata oficialuloj, tial oni post kelkjara hezito nomumis en la jaro 1959 oficialan Ĉeĥoslovakian Esperanto-Komitaton. Ĝi funkciis ĉe "Osvětový ústav" (kleriga instituto) en Praha, kiu komencis eldonadi neregulan bultenon

"Zprávy ČEV" -

Informoj de Ĉeĥoslovaka Esperanto-Komitato. Komence ĝi enhavis nur bazajn informojn en la naciaj lingvoj

(ĉeĥa kaj slovakaj), iom post iom ĝi pli ampleksiĝis, envicigis ankaŭ Esperanton, aldoniĝis kultura almetaĵo. La lasta - 30-a numero, aperinta oktobro 1968 aspektis jam kiel vera kaj eĉ kvalita Esperanto-gazeto en amplekso de 24 grandformataj paĝoj. Tamen, la rolon de gazeto ĝi ne povis plenumi, ĉar ĝi ne estis - krom en lasta periodo - ordinare abonebla kaj ĝin oni dissendis nur al kluboj, rondetoj kaj funkciuloj. Sed en tiuj jaroj la tempo jam maturiĝis por sendependiĝo de la movado - estis ja la jaro de "Praga printempo"!



La Ĉeĥoslovaka Esperanto-Komitato alelektis kelkajn aktivulojn, kiuj komune kun nomumitaj membroj de ĈEK transformiĝis je Preparkomitato por fondo de memstara Esperanto-Asocio. La komitato decidis eldoni por ĉeĥaj esperantistoj novan informan bultenon, kiu perspektive transprenus rolon de oficiala Esperanto-gazeto. Post vigla diskuto estis elektita la nomo "Starto", kiu tiam simbolis novan starton de la movado en Ĉeĥoslovakio (dum slovakaj esperantistoj konservis por si jam tradician "Esperantisto Slovaka").


Oktobre 1968 aperis do - samtempe kun "Informoj de ĈEK" - la unua numero de Starto. Ĝi estis tre modesta - skribmaŝinaj litertipoj, 11 paĝoj, la titolo laŭ grafika propono de J. Nevan, responda redaktoro estis O. Kníchal. Kaj pri kio skribis tiu ĉi unua numero? Parte ĝi reprenis materialojn el "Informoj de ĈEK" (kiu havis tutŝtatan destinon, do ankaŭ por Slovakio), sed kelkajn paĝojn ĝi dediĉis al renaskiĝo de organizata movado en ĉeĥa parto de la ŝtato. En la sama jaro 1968 aperis unuaj du numeroj, la decidan signifon havis poste la 4-a numero. Ĝi aperis en aprilo 1969 jam post la konstitua kongreso de Ĉeĥa Esperanto-Asocio, ĝi estis signita kiel "kongresa numero" kaj eldoniĝis en 5000 ekzempleroj. La unuan fojon ĝi

portis indikon "oficiala organo de ĈEA", ĉar pri tio decidis i.a. la konstitua kongreso, kiu efektiviĝis en Brno 29.-30. de marto samjare. Do, tiel ekstis kaj aperis nia oficiala organo, kiu ĝuste atingas sian ducentan numeron.

Kiaj estis pluaj notindaj paŝoj de ĝi?

La unuaj 46 numeroj konservis originan grandan formaton (A4), ĝi estis skribmaŝine tajpita kaj facilmaniere per "rotaprint" obligita, laŭkvalite ĝi estis vere modesta, nur sporade ĝi havis ne tro klarajn fotografaĵojn. Tiam la teknikaj kondiĉoj apenaŭ permesis plenumi pli altajn pretendojn. La 47-a

numero aperis komence de la jaro 1975 en malpli granda formato, kiun la gazeto havas ĝis nun. Samtempe rimarkeble kreskis teknika kvalito, estis ekuzataj grafike pli allogaj litertipoj, ĉefe por gravaj tekstoj, oftigiĝis fotografaĵoj, kies kvalito okulfrape pliboniĝis. Videbla ŝanĝo okazis en 1976. Tiam komplikiĝis financa situacio de la asocio kaj estraro serĉis novajn monfontojn. Estis decidite enhavigi en Starto pagatajn reklamojn, pri kio oni tiam devis peti permeson (!) de ministerio. Ĝi permesis kaj de la 53-a numero publikigi multaj reklamofertoj, foje ili eĉ plenumis grandan parton de la ekzemplero.



Al forgesemuloj mi alrememorigu, ke en "socialisma erao" oni devis peti eĉ pri ŝanĝo de presejo, kion de tempo al tempo la asocio devis fari, ĉu pro nekontentiga kvalito de presado, ĉu pro longaj presterminoj, ĉar nia organo ofte ne estis por presejo preferinda laboro. Se oni rigardus kolofonon de unuopaj numeroj, oni trovus vicon da diversaj presejoj: Mezbohemiaj presejoj Praha, presejo de Teknikaj servoj Neratovice, Teknika centro de Ŝtata biblioteko en Praha, Orientbohemiaj presejoj en Trutnov, presejo RUCH en Liberec, presejo Autokemping Strážnice, Protis Brno, ekde 1995 ĝin daŭre produktas Opatisk en Opava. Klaras, ke presi Starton en lokoj iam tre malproksimaj de la asocia sidejo alportis diversajn komplikojn lige kun korektado kaj dissendado de la gazeto. Krom la verda estis Starto ĝis 1985 nur nigrokolora, poste tamen la kovriloj estis diverskoloraj ĝis 1990, ekde la 170-a numero ĉiu jarkolekto karakteriziĝas per iu koloro.

La enhavon de Starto, kiu longan tempon aperadis kiel "neregula asocia bulteno" laŭ oficiala eldon-permeso, ĉiam parte kreis legantaro - do la membraro de la asocio. Tamen ne ĉiam la kontribuemo de ĉeĥaj esperantistoj estas fruktodona kaj tial ĉefan laboron por kompletigi ĉiun

numeron devis fari responda redaktoro. Tiu ĉi funkcio tial bezonis sufiĉe streĉan kaj ofereman laboron. La funkcion plenumis dekomence O. Kníchal ĝis 1979, sekvajn tri jarojn komune prezidanto dr. J. Jermář kaj sekretario Z. Křimský. En aprilo 1983 Křimský ekŝiĝis kaj post komplika traktado en la asocia estraro transprenis la respondecon J. Patera. Ĝis la jaro 1990 subtenis la ĉefredaktoron redakta kolektivo, en kiu dum jaroj alternis multaj konataj ĉeĥaj esperantistoj. En la jaro 1985 eniris ĝin ankaŭ M. Malovec, kiu poste transprenis la postenon de respondeca redaktoro kaj plenumas ĝin de la 142-a numero

ĝis hodiaŭ. Komence helpis lin Karel Daněk, kiu venis kun novaĵo - perkomputila prilaboro. Gravan taskon plenumas (en lastaj jaroj) M. Pastrňák kiel ĉasanto de tajperaroj kaj aliaj pretervidiĵoj. Meritindas ankaŭ noti tiujn, kiuj prizorgis grafikan aspekton de la organo - J. Klement, M. Labašta, V. Kočvara, J. Hanousek, eksterordinare freŝajn kaj allogajn bildojn desegnis ekde 1981 konata P. Rak.

Aspekton de vera gazeto Starto akceptis definitive en 1994, kiam komputila programo kun tajposimilaj litertipoj estis anstataŭigita per programo kompost-imita, kaj de



tiam ĝi bone reprezentadas nian asocion.

Kiel fini tiun ĉi skizan historieton de ducento da Startoj? Mi tuŝu laste ĝian nomon. Ĝi estis elektita antaŭ trideko da jaroj intence, ĉar tiu iel simbolis la novan starton de nia enlanda movado. Cetere, tion mi jam menciis. Dum pasintaj jaroj plurfoje oni volis ŝanĝi la nomon, por ke oni ne daŭre "startu" la movadon. Tamen poste oni ĉiam cedis de alinomigo, ĉu pro jam ioma tradicio, ĉu pro aliaj kialoj. Definitive oni volis nuligi ĝin kaj oficiale eĉ ĉesigis la aperadon en aŭgusto 1990. Tiam la ekzistanta, sed neniam bone funkcia Cĥoslovaka Esperanto-Komitato (kiun post fondo de du Esp. Asocioj en Cĥoslovakio formis ekde 1987 reprezentantoj de ambaŭ asocioj kaj kiu celis kunordigi agadon de la du asocioj - do alia organo ol tiu en 1959 de la ŝtato nomumita) decidis lanĉi l. l. 1991 novan tutŝtatan gazeton "Perspektivo". Cetere, la kunligon de du ekzistantaj Esperanto-gazetoj en Cĥoslovakio, nome Starto kaj Esperantisto Slovaka - nia asocio kelkfoje, tamen senrezulte



instigis, ĉar tio certe alportus ŝparon de financoj kaj pli altan prestiĝon. Sed malgraŭ la akceptita plano post jarŝanĝo venis el Bratislava denove revoko de komuna decido kaj nia asocio devis rapide reveni al ĝistiamata stato kaj pludaŭrigi en "startumado". Nuntempe jam ŝajne ne estas tempo matura por ŝanĝi la nomon, kiun oni nun konsideru nur kiel simbolo de renaskiĝo de nia asocio post malfacilaj jaroj de deviga silento, ne kiel konstanta komencado de la movado. Starto jam havas interesan kaj sufiĉe bonan tradicion, la plej longan en nialanda movado, do ĝi restu ankaŭ por estonteco.

Ni deziru al ĝi kaj al ĉiuj, kiuj ĝin aktive subtenas, kontribuas, skribas, komputilas, korektas kaj diversmaniere prizorgas ĝisatendi minimume la 250-an numeron!

*VI. Kočvara*

#### **Noto de la redaktoro:**

Sur la unuopaj paĝoj vi vidas kelkajn el la simboloj, sub kiuj Starto aperadis en sia historio.

## ThDr. Rudolf HORSKÝ (1914 - 2001)



Honora Membro de ĈEA, pastoro de Ĉeĥoslovaka Husana Eklezio, episkopo, profesoro kaj dekano de Husana teologia fakultato, mortis la 4-an de aŭgusto 2001 en Prago. De sia juneco li estis esperantisto, kiu aktive laboris en la movado. Li fondis KELI-sekcion de ĈEA kaj longe estis ĝia prezidanto kaj samtempe ankaŭ estrarano de KELI. Li aktive partoprenis multajn kongresojn (prelegojn, predikojn), instruis E-on en kursoj kaj en Somera E-tendaro en Lančov, kelkajn jarojn li estis prezidanto de KE en Prago. Ofte li prelegvojaĝis tra diversaj landoj, priskribis siajn travivaĵojn (ekz. Vojaĝo al Hispanio), prelegis pri famaj personoj de nia historio (M. J. Hus, J. A. Komenský, Jiří z Poděbrad).

Regule li publikigis en ĉeĥaj kaj E-gazetoj, plej ofte en Dia Regno, eldonis eklezian kantareton (Kantu al la eternulo) ktp. Lian laboron aprezis ministerio de kulturo okaze de la 400-a naskiĝdatreveno de J. A. Komenský per Honora medalo. La 7-a asocia kongreso 1993 en K. Vary nomis lin Honora Membro de ĈEA.

La adiaŭan diservon en Prago

(2001-08-10) gvidis patriarko Josef Špak. En la nomo de KELI kaj de ĈEA adiaŭis la mortinton la asocia sekretario Pavel Polnický.

## La vilao "Esperanto"

La foto de s-ano Jan Kovařík el Opava sur la frontpaĝo prezentas vilaon "Esperanto" en Luhačovice, pri kiu scias el niaj membroj nur malmultaj.

La vilaon konstruis inter la jaroj 1932-33 ĉeĥ-amerikano Vaněk kaj nomis ĝin New York. Kiam proksimiĝis la dua mondmilito, s-ro Vaněk vendis domon al esperantista familio Bůřil el Brno kaj revenis en Usonon. Novaj posedantoj alinomis vilaon "Esperanto" kaj ĝi iĝis centrejo de socia vivo de sudmoraviaj esperantistoj.

Sed baldaŭ nazioj konfiskis la domon por Hitlerjugend kaj familio Bůřil rajtis uzadi nur unu subtegmentan ĉambreon. Postmilito la proprietuloj akiris en la domo denove plenajn rajtojn, sed nur ĝis la jaro 1948, kiam konfiskis ĝin la komunisma loĝej-fonduso. Tiu stato daŭris ĝis la jaro 1990, kiam la vilaon dum restituo ricevis reen la nepo de originaj posedintoj.

Konfuzan historion de la nuna loĝdomo nun rememorigas nur la nomo "Esperanto" sur la fruntaĵo.

La valorajn detalajn informojn de s-ano J. Jaško el Luhačovice reduktis

*Jaroslav Žák*

## 86-a UK en Zagrebo

Ŝtatprezidento Stjepan Mesiĉ estis ne nur alta protektanto de la kongreso, sed li venis kun tuta kamarilo solene malfermi ĝin, eldirante du lastajn frazojn en Esperanto. Trambiletoj por ĉiuj kongresanoj estis en la tuta urbo senpagaj. Televido kaj radio intervjuis kelkfoje kaj en la loka gazeto Veĉernji List ĉiutage aperis kelkaj artikoloj, ekspoziciitaj ĉe kongresa enirejo. Dalmataj hundoj, ĉe ni maloftaj, ludis rolon en la nacia kultura programo sur la scenejo, ili partoprenis eĉ dum la kongresa balo obeante esperantlingvajn ordonojn.

S-ro Milan Bandiĉ, urbestro de Zagrebo, partoprenis inaŭguron de monumento Futuro, la 22-an de julio. Ni faris multajn fotojn, inter kiuj plej plaĉas tiu, kiam Miŝjo, filo de ŝoforo, tragrimpis truon en la piedestalo de la monumento. Ankaŭ la nepo de Dr. Zamenhof, L. C. Zaleski-Zamenhof, ĉeestis.

En amase partoprenita diservo en katedralo elokvente predikis pastoro Adolf Bukhard, KELI-prezidanto.

En belartaj konkursoj de UEA gajnis en eseoj unuan premion de Luigi Minnaja Ing. Jan Werner el Brno.

Kiu volis akiri la kongresan stampon, tiu devis entrepreni malgrandan maratonon al la ĉefa poŝtoŝtanco, situanta malproksime de la kongresoj.

Kunvenon de Rondo Kato partoprenis akademiano Marjorie Boulton, kiu ĝuige rakontis pri siaj katoj.

Al la kongresa balo sur la placo Jelaĉiĉ estis invitataj ne nur ĉiuj zagrebanoj, sed en sia imperiestra kaleŝo alveturis ankaŭ Maria Teresa, reprezentata de la fama aktorino Vida Jerman.

El la ekskursoj eble plej multe plaĉis banado en la maro en Rijeka. Ofte ni estis konfuzitaj, ĉar pluraj interesaj programoj okazis samtempe. Rava estis la Internacia Arta Vespero kun eminentaj aktoroj, kantistoj kaj kongresa kanthoro. Dum la adiaŭo la nove elektita asocia prezidanto Renato Corsetti kortuŝis multajn ĝis larmoj.

*Drahomír Kočvara*



Sub tiu ĉi kapo aperadis ĉiutage la kongresa kuriero.



## KONGRESAJ MESAĜOJ

(fragmentoj)

### Stjepan Mesić, kroatia prezidento:

Mi dirus, ke ĝuste en la nuna epoko, en la tempo de la tutmondiĝo, kiu estas kritikata, sed neevitebla, la graveco de Esperanto povas nur kreski. En la mondo, kiu ne senkiale nomiĝas universala vilaĝo, la ideo pri universala lingvo ŝajnas al mi plene natura. Kompreneble, oni ne rajtas ion ajn **trudi perforte**. Sed oni ankaŭ ne rajtas **fermi la okulojn** antaŭ la bezonoj, kiujn alportas la nova epoko.

### Ĝenerala sekretario de Unuiĝintaj Nacioj:

La Esperanto-movado ĉiam partoprenis la celon interligi homojn trans naciaj limoj. Hodiaŭ ni vivas en nova epoko de komunikado, en kiu eblas transsendi informojn pli rapide kaj pli foren ol iam ajn antaŭe. Tamen unu homo el du neniam faris aŭ ricevis telefonvokon. Larĝa diĝita disdivido forbaras multajn malriĉajn landojn de la rimedoj de informteknologio. Unuiĝintaj Nacioj, kunlabore kun la civila socio kaj la privata sektoro, havas firman volon transponti tiun dividon.

Inter la novaj iniciatoj, pri kiuj mi

esperas, ke ili konstruos diĝitajn pontojn al la evolulandoj, estas la Teknologia Servo de UN, UNITEs. Tiu norda reto de volontuloj dividas sian scipovon kun grupo en sudaj landoj, donante trejnadon pri la aplikado de teknologio. Plibonigita komunikado havigas multajn avantaĝojn: por distanca lernado, pli rendimenta negocado kaj pli rapida reago al urĝaj okazaĵoj. Dividante la neelĉerpeblan varon (informadon) ni povas plibonigi ĉies aliron al edukado, sano kaj prospero.

(*rendimento - ŭĉinmost*)



### John Daniel, UNESKO:

La laboro de Unesko en edukado, komunikado kaj kulturo daŭre emfazas la gravecon de multlingvismo kaj de konservado de lingva diverseco en la tutmondiĝanta terĝlobo. Tamen, ni rekonas, ke tia diverseco neniam estu uzata kiel preteksto por perforto aŭ konflikto. Jen nia defio. Ni komune dividas tiun defion kun niaj kunlaborantoj tra la mondo, kiel ekzemple vi, kiuj dediĉis sin al la celoj de la Dialogo inter Civilizoj.

La multnombro de kulturoj, ilia granda diverseco, prezentas unu el la plej valoraj riĉaĵoj de la Homaro. La dialogo inter ili permesas kompreni, permesas estimi, respekti kulturojn malsamajn. Sen tia dialogo, sen tia kompreno, kulturo fremda aperas stranga, aperas malamika, inspiras malestimon, disdegnon, malamon. Ja en multaj lingvoj naciaj la vortoj "fremda" kaj "stranga" posedas la saman radikon: "strange" en la angla kaj "e'trange" en la franca signifas "strangan", dum "stranger" kaj "e'tranger" signifas "fremdulon"; tiel do homon venantan de stranga lando, personon elvokantan ian strangan kulturon...

Tamen la dialogo inter kulturoj devas sekvi sian kulturon propran: la kulturon de dialogo. Kulturon, kiu implicas egalecon de la dialogantoj, zorgantaj eviti altrudadon de siaj respektivaj pensmanieroj, de siaj respektivaj kulturoj, zorgantaj respekti kulturon de la Alia, eĉ tiun de plej eta komunumo. La menciitaj kondiĉoj de kulturo de dialogo povas esti strikte observataj dank' al la Lingvo Neŭtrala. Belan ekzemplon de la kulturo de dialogo prezentas ja la Universalaj Kongresoj de Esperanto.

Nia ĉi-jara temo "Kulturo de dialogo - dialogo inter kulturoj" konsistigas parton de la Jaro de Dialogo inter Civilizoj lanĉita de Unuiĝintaj Nacioj en la jaro 2001. Nia Esperanto estas kulturo, kiu favoras, eĉ fundamentas, malferman dialogon. Ĝi estas dialoga kulturo. Se tiel estas, kiel ni utiligu Esperanton por faciligi komunikadon inter la grandaj civilizoj kaj kulturoj de la mondo, kun ties diversaj religioj, historioj, aspiroj, deziroj, lingvoj, popoloj, etikaj tradicioj? Kiel fari el Esperanto, en plena realo, lingvon, kiu ebligu pli da kompreniĝo inter la homoj? Ne sufiĉas diri al tiuj, kiuj jam partoprenas la dialogon, ke Esperanto pli bone servus ilin ol la etnaj lingvoj, se ili volus uzi ĝin. Necesas, ke ni mem, kiuj neniel estas perfektaj, komencu ankaŭ inter ni dialogon, kiu malfermu la mondan diversecon en ties glora, sed foje minaca vario.



## Nova estraro de UEA

UK en Zagrebo elektis jenan estraron: Prezidanto: d-ro **Renato Corsetti** (Italio), vicprezidantoj prof. **Lee Chong Yeong** (Koreujo) kaj prof. **Humphrey Tonkin** (Usono), ĝenerala sekretario s-ro **Ivo Osibov** (Kroatio), komitatoj: s-ino **Ans Backer** (Nederlando), s-ro **Gbeglo Koffi** (Togolando), **Andrej Grigorjevskij** (Rusio) kaj s-ino **Michela Lipari** (Italio).

## Belartaj Konkursoj 2001

**Poezio:** 1. Sten Johansson (Svedio) pro "La kvina forto"; 2. Sten Johansson pro "Haŭto"; 3. Mauro Nervi (Italio) pro "La floro kaj la frukto".

**Prozo:** 1. Paul Gubbins (Britio) pro "Gamp"; 2. Lena Karpunina (Germanio) pro "La pluvo en Ĉenstoĥovo"; 3. Lena Karpunina pro "La demando de emancipiĝo."

**Teatraĵo:** neniuj premioj aljuĝita

**Eseo:** 1. Jan Werner (Ĉeĥio) pro "Kulturo de komunikado"; 2. Stefan MacGil (Hungario) pro "Kriptaj krucevortenigmoj en Esperanto"; 3. Ne aljuĝita

**Infanlibro:** La hobito, aŭ tien kaj reen (J. R. R. Tolkien, tr. Chris Gledhill kaj William Auld)

**Kanto:** Anja Karkiainen kaj Vesa Pölkki (Finnlando) pro "Ĉaŭ, adiaŭ, ĝis revido".

## La plej longa tago en la vivo de Maria Teresia

estis la titolo de teatraĵo de Miro Gavran, kiun prezentis kroata aktorino Vida Jerman kun la teatra grupo "Ponto" la 26-an de julio en Kroata Nacia Teatro. (Eble temis pri la sama aŭ simila dramo, kiun antaŭ nelonge prezentis nia televido kun Stella Zázvorková.) La prezentaĵoj sekvis 10-minuta aplaŭdo kaj danko de la nova Estraro de UEA. Sed aperis ankaŭ indignita artikolo de profesorino pri historio, kiu foriris dum la prezentaĵo, ĉar la dramo ŝajnis al ŝi ofendo kontraŭ la granda ŝtatistino.

## Juna Mozart el Rusio

Tiel la internaciaj muzikspecialistoj nomas **Andrej Korobeĵnikov**, laŭreaton de 12 internaciaj piankonkursoj, studenton de la kvara lernoĵaro de Jura Fakultato ĉe Eŭropa Jura Universitato en Moskvo. Li estas **14-jara** ano de la Internacia Akademio de la Sciencoj en San Marino. Lia koncerto speciale por la kongresanoj de la 86-a UK okazis marde en la koncertejo "Lisinski" (salono Ivo Lapenna).

## KONGRESA REZOLUCIO

"La 86-a UK de Esperanto, kunveninta en la urbo Zagrebo, Kroatio, de la 21 ĝis la 28-a de julio 2001, kun la temo **kulturo de dialogo - dialogo inter kulturoj**:

NOTINTE, ke la UN nomis la jaron 2001 jaro de dialogoj inter civilizoj;

MEMORIGANTE, ke Esperanto-Movado havas longan historion de alproksimigo de la homoj sur bazo de egaleco trans barilo de kultura diferenco, reciproka malrespekto, eĉ militaj kondiĉoj, jam de la klopodoj de Zamenhof alproksimigi la mondajn religiojn tra la agado de UEA por reunigi familiojn dividitajn en la unua mondmilito ĝis nuntempaj elpaŝoj, kiel ekzemplo de la utiligo de Esperanto por la komunikado inter indiĝenaj popoloj, la tiel nomata **INDIĜENAJ DIALOGOJ**, kaj por alproksimigi la Korean kaj Japanan popolojn;

ATENTIGAS ke, kiel internacia lingvo ne ligita al ŝtataj kulturaj interesoj, Esperanto konsistigas idealan perilon de dialogo inter la kulturoj. Tra pli ol cent jaroj la Komunumo de Esperanto-parolantoj kreis tradicion de dialogo transnacia kaj transkultura, kio plene meritas karakterizi ĝin dialoga kulturo. Efika dialogo postulas respekton al lingva, kultura kaj ideo diverseco kaj bezonas ne nur mensan malfermitecon, sed ankaŭ la kapablon aŭskulti. Al-

done al siaj multaj rimarkindaj atingoj, Esperanto havas signifan ne ekspluatan potencialon kiel dialoga lingvo; Sekve, la Kongreso

1. Gratulas al UN, ke ĝi decidis lanĉi klopodojn senpere alproksimigi kaj interkomprenigi la homojn, sen kies konvinko la registaroj estas esence senpovaj;

2. Aparte petas al UN daŭrigi tiun ĉi kampanjon preter la jaro 2001;

3. Atentigas, ke tiuj klopodoj postulas proksiman kunlaboron de NRO-oj;

4. Rekomendas, ke UEA proponu al UNO sian kunlaboron kiel organizaĵo unike bone kvalifikita por difini en kunlaboro kun aliaj organizaĵoj la eblon kaj limon de tiu dialogo kaj ĝin realigi;

5. Rimarkindas, ke efika dialogo inter diversaj kulturoj sur lingve demokratia bazo, postulas prikonsideron de la bezono de nova internacia lingva ordo;

6.. **KAJ FINE**, apelacias al ĉiuj parolantoj de Esperanto, ĉiuj lokaj, regionaj, landaj kaj internaciaj E-organizaĵoj kaj ĉiuj, kiuj subtenas la celojn de Esperanto, kunlabori en la daŭra konservado kaj plifortigo de la dialoga kulturo, kiun prezentas Esperanto kaj daŭre partopreni en la klopodoj de UN krei dialogojn inter la civilizoj je tutmonda skalo, kiu estas tiel esenca por la paca evoluigo de la homa socio."

## Sukcesa busvojaĝo al Kroatio

Esperanto-klubo de dr. Schulhof kun Asocio de E-handikapuloj el Pardubice organizis la busvojaĝon al UEA-Kongreso en Zagrebon. Kvankam la buso ne estis plena - pro pluaj Zagrebaj kongresoj, internaciaj renkontiĝoj kaj junulara tendaro okazintaj tie je unu semajno pli frue, tamen la ekskurso ne estis malprofita dank' al modesta tranoktejo en la lernejo por handikapitaj infanoj. Ĝin mem proponis al nia asocio la gvidantino de tiu lernejo en Zagrebo.



La partoprenintoj estis el 16 lokoj de Ĉeĥa respubliko. Al nia grupo apartenis ankaŭ membroj de Internacia Klubo de EH - kvar francoj, polo, svisino, germano kaj kubanino, kiuj volis kun ni malmultekoste tranoktadi, do ni estis fakte internacia grupo, kiu bonege komprenis unu la alian.

La lerneja kuirejo kaj manĝejo

estis je nia dispono, do ni tie mem komune preparadis matenmanĝojn, iam eĉ vespermanĝojn, krom tio la ŝoforo de la buso kun sia edzino kuiris por ni trifoje komfortan manĝon.

AEH kiel faka asocio de UEA eluzis la eblecon propagandi en sia stando pri sia agado, pri la preparata IV-a kongreso, kiu efektiviĝos en septembro 2002 en Jánské Lázně, kaj al interesuloj disdonadis multajn afiŝetojn kaj invitojn. La deĵorantoj respondadis multajn demandojn kaj akiris dum tiu unu sola antaŭtagmezo preskaŭ dudek novajn membrojn. Dum la kunveno de fakaj asocioj la prezidantino parolis pri la agado de AEH.

Granda avantaĝo estis, ke ni estis ĉiutage buse veturigataj de nia tranoktejo al la kongresejo kaj reen, posttagmeze al diversaj ekskursoj eĉ vespere al kongresaj kulturaj programoj. Ni tiel povis ekkoni kaj Zagrebon, kaj proksimajn urbojn. Ni vizitis turisme interesajn lokojn Krapina, Samobor, monton Medvednica kaj kastelon Varaždin. Ni banis nin eĉ en la maro ĉe Opatia kaj en la belegra Zagreba Jarun-lago.

Laŭ venantaj reagoj la partoprenintoj estis kontentaj.

*Jarmila Rýznarová*

## El la ferma parolado de la nova prezidanto de UEA

La taskoj de la Esperanto-movado estas esence du: - **produkti esperantistojn - produkti servojn por la esperantistoj.** Kompreneble sub la nocio “servoj por la esperantistoj” vi rajtas enkalkuli ĉiuspecan kulturan aktivadon, verkadon de literaturo, organizadon de okazoj, por ke esperantistoj renkontiĝu kaj parolu sian lingvon, ktp. Persone mi opinias, ke la unua tasko, “produkti esperantistojn”, estas pli malfacila ol la dua, kiel ĉiuj vi malnovaj movadanoj ja scias. Tial la nova labor-plano de UEA insistas pri ĝi.

### Labor-plano

Vane vi serĉos en ĝi magiajn formulojn, ĉar magiaj formuloj ne ekzistas. La labor-plano insistas pri tri prioritatoj: - **informado - instruado - utiligado.** Certe, nenio nova. Sed nia tasko nun estas aktualigi ilin tiel, ke la nuna mondo povu reagi al ili.

### Informado

Mi estas konvinkita, ke la mesaĝo, kiun Zamenhof volis transdoni al la mondo, estas enhance ankoraŭ tute aktuala. Tiu mesaĝo esence diras:

*“Homoj ĉesu batali inter si pro naciaj malsamecoj. Ili provu kompreni kaj ami unu la alian. Ili faru tion surbaze de egaleco inter ĉiuj nacioj, -kulturoj, lingvoj. Por atingi tiun bazon de egaleco, la internacia neŭtrala lingvo Esperanto estas necesa.”* La labor-plano diras, ke estas tasko de ni ĉiuj, de niaj organizaĵoj, doni al la mesaĝo de Zamenhof nun kompreneblan veston kaj prezenti ĝin al la mondo. Ni laboras por la mondo ne por ni mem. Ni laboras por plibonigi la mondon, ne por amuzi nin mem.

### Instruado

Ni devas instrui nian lingvon al homoj, al multaj homoj. Ni mem devas fari tion, ĉar ni ne povas esperi, ke en la nuna momento registaroj aŭ aliaj homoj, kiuj estas pagataj por instrui lingvojn aŭ por atingi internacian interkompreniĝon, faros tion. Ĉiukaze la ĵus aprobita labor-plano reemfazas la interkonsenton inter UEA kaj ILEI, la Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj, por plifiki instruadon kaj pliampleksigi ĝin. Tamen, ĉefe ni devas konvinki, ke instruantoj de Esperanto faras socie utilan laboron. Ni ne devas honti pro la “mokoj de l’homoj”, pro la mokoj de tiuj, kiuj instruas aŭ volas lerni “utilajn”

homoj”, pro la mokoj de tiuj, kiuj instruas aŭ volas lerni “utilajn” lingvojn. Ni laboras por paco kaj egaleco inter ĉiuj landoj, grandaj aŭ malgrandaj. Tiuj, kiuj devus honti, estas la “komercistoj de la angla aŭ de aliaj mondaj lingvoj”, kiuj celas personan gajnon per vendado de siaj samlandanoj al la venkintoj, al la fortuloj.

### Utiligado

“Kial vi lernas Esperanton? Ĝi estas tute senutila!” Tion ĉiu el ni aŭdis plurajn fojojn dum sia vivo. Ĉiu el vi scias, ke Esperanto estas utila. Tamen la kritikantoj aludas al io alia. Ĝenerale ili volas diri, ke Esperanto eble estas utila por persona pliklerigo, sed ke ĝi certe ne estas utila por praktikaj vivbezonoj. Efektive multo restas por fari en ĉi tiu kampo. Certe legado de beletro estas utiligado. Kontaktado pere de la Jarlibro de UEA kaj gastado ĉe fremdaj familioj pere de la Pasporta Servo de TEJO estas utiligado. Interŝanĝo de internaciaj spertoj pere de la fakaj asocioj estas utiligado. Feriado en Esperantujo estas utiligado. Tamen, mankas ankoraŭ multo, por ke Esperanto iĝu vere utila lingvo. Ekonomiaj agadoj, ekzemple, estas ankoraŭ en sia

komenca stadio. Mi ne povas ne memorigi vin pri la ideoj de nia malagasa samideano Henriel Fidilalao, kiu antaŭvidas tutan programon de kunlaborado inter la Nordo kaj la Sudo de la mondo pere de Esperanto por doni al multaj junaj esperantistoj en Afriko konkretan ŝancon por plibonigi sian vivon per simplaj teknikaj rimedoj. Eble ni devas provi meti tiujn ideojn en la praktikon.

Vi eble volas ankoraŭ kvaran aferon. Tiun aferon volas ĉefe la homoj, kiuj ne estas ĉi tie, kiuj neniel iam ajn povos esti ĉi tie. Vi volas, ke ni venku la ekonomiajn, sociajn, politikajn barojn, kiuj tenas grandajn partojn de nia komunumo ekster kontakto kun la cetera komunumo. Realigi tion, evidente, estas io ankoraŭ pli malfacila ol la punktoj, pri kiuj ni parolis antaŭe. Sed ankaŭ tiudirekte jam ekzistas se ne ideoj almenaŭ deziroj. Viaj petoj estas al mi klaraj sed same klaraj estas la “obstinaj baroj” en la vojo de la realigado. Nur per via helpo ni povos sukcesi.

Renato Corsetti

## Cent jaroj de organizita Esperanto-movado en Ĉeĥio

La 27-an de oktobro 1901 per permeso de la polica direkcio en Brno naskiĝis la "Unua societo de aŭstraj esperantistoj en Brno" kaj tiel startis nialanda organizata esperantista movado, preparata ekde 1900. La 9-an de novembro 1902 okazis la fonda kunveno de "Klubo de Esperantistoj" en Praha kaj en la sama monato aperis la unua numero de la gazeto *Český esperantista* (Bohema Esperantisto), eldonata de Ĉejka. En 1903 oni presis la enhavon de la tuta jarkolekto kaj la titolpaĝon, sur kiu tekstas: *Organo de »Aŭstria societo de Esperantistoj« en Brno kaj de »Klubo de Esperantistoj« en Praha.*

Do ĉi tiujn jarojn (1900-1903) ni povas konsideri kiel "startajn", ne povante tute klare difini, kiu el la gravaj datoj estis la vera "starto". La klubo en Brno festis sian centjarigon ĉijare la 26-an de majo 2001, sed kiel tutasocia datreveno eble pli taŭgus la jaro 2002, ĉar per fondo de dua klubo en 1902 estiĝis bazo de asocio. Plie la jaro 2002 estas jaro de la 10-a kongreso de ĈEA kaj de la 50-a SET Lančov.

En la komenco de la movado staras la nomoj de **František Vladimír Lorenc** (nask. 1872), redaktoro de revuo "Omladina" (1891-1893) kaj aŭtoro de la unua lernolibro "por Bohemoj" (1890!), de **Theodor Ĉejka** (nask. 1878), instruisto kaj eldonanto de pluraj

lernolibroj ekde 1900, kaj de lia kunlaboranto **Josef Krumphole** (nask. 1870). Malpli konataj estas la instruistoj **Valentin Bílík** en Znorovy (nun Vnorovy), **Jan Holub** (nask. 1878), en Verovicě kaj **Matouš Daniček** en Znorovy.

Al la amikoj de Ĉejka apartenis **Karel Pelant** (nask. 1874), kiu fine de la 19a jarcento laboris kiel redaktoro ĉe Rovnost. Li fariĝis la unua prezidanto de la societo en Brno kaj verkis broŝuron "Idea feĉi mezinárodní" (Ideo de la internacia lingvo). En 1902 li foriris Pragon, kie li estis ofta partoprenanto en la kunvenoj kaj diskutoj de la Praga klubo.

Inter la fondintoj de la societo en Brno eminentiĝis **Václav Kovanda** (ŝajnas, ke li estis la iniciatinto), **Jan Kajš**, **Josef Černík**, **Julie Kramolišová**, **Karel Drexler**, **Josef Valíček**, inter la fondintoj de la Praga klubo ni trovas la nomojn **Eduard Weinfurter**, **S. K. Neumann**, **František Barth**, **J. Görner**, **František kaj Eduard Kühnl**, **X. Hainthalová**, **S. Kamarýt**, **H.K. Bouška**.

Pro la aŭstra burokrateco estis fondo de societo kelkmonata afero. Jen kelkaj detaloj:

La 19-an de aprilo 1901 (en nia broŝuro *Cent jaroj de Esperanto en Brno* ni erare skribis 1900) kelkaj "proponantoj en Brno" prezentis al Ministerio pri internaj aferoj statuton de nepolitika societo de esperantistoj. La 13-an de majo la polica direkcio en Brno anoncis rifuzon de la prezentita statuto, ĉar ĝi ne enhavas preskribon pri forigado de malpacoj en la fondota societo.



La 22-an de majo deputito Josef Hybeš persone interpelaciis la ministrojn pri internaj aferoj en la Viena parlamento ("*Neniu juristo kapablas diri, ke statuto de li verkita efektive estos aprobita... Per kio la sinjoro ĉefministro povas ĉi tiun nekredeblan kaj nur en Aŭstrujo ŝatatan ĉikanadon de la civitanoj pravigi?*").

Post du semajnoj, la 5-an de junio, per edikto de Ministerio pri internaj aferoj la statuto de Unua Societo de Aŭstraj Esperantistoj "ne estis malpermesita". La konsento de la Landestrejo de Moravio portas la daton la 3-an de aŭgusto kaj de polica direkto en Brno la 27-an de oktobro. La 6-an de novembro K. Pelant kiel prezidanto anoncis al la polica direkto, ke okazos instrua kurso en la lingvo Esperanto kaj la 16-an de novembro la polica direkto oficiale informis lin pri la permeso de la Societo. Li devis prezenti la statuton kaj protokolon de la konstitua ĝenerala kunveno.

## El la centjara agado en Brno

Januare 1902 la Societo okazigis internacian kostuman balon, kie noktomeze estis prezentita "vivanta bildo" (kostumita grupo pozanta), kie Anglo donis manon al\* Buro, Germano al Ĉeĥo, Slovako al Hungaro, Ruso al Ĉino kaj super ili staris diino de paco.

Novembre 1902 la Societo ŝanĝis sian statuton por povi organizi publikajn kursojn en la tuta Aŭstrio sub la nomo "Aŭstria Societo Esperantista" (Rakouský spolek esperantistů).

En februaro 1905 estis fondita

Germana Grupo Esperantista (Verein deutscher Esperantisten) kun prezidanto Jakob Dieterich kaj sekretario Franz Podloučka. La ĉeĥa parto nomis sin poste "Klubo de Bohemaj Esperantistoj" kaj kun la fondaĵo 1901.

Decembre 1908 en eksterordinara ĝenerala kunveno la Klubo ekzistis el Bohema Unio Esperantista kaj membriĝis ĉe Bohema Asocio Esperantista (kiu estis demokrata kaj progresula). El la Klubo foriris idistaj reformemuloj, inter ili Jan Kajš. Arkivaj dokumentoj el la postaj antaŭmilitaj jaroj pri la Klubo ne estas atingeblaj.

Post 1918 akceptis la Klubo la nomon Esperantista Klubo (Klub esperantistů). En Brno estis fonditaj novaj organizaĵoj, ekz. Laborista Esperantista Asocio (L.E.A., Klub dělnických esperantistů) 1937 - 1938, Filio de EAĈSR en Židenice (en 1948, depost 1951 ĉe Uzina Klubo de Unua Brunna Maŝinfabriko kaj fine kunigita kun la nuna Klubo). Ekzistas skribaj atestoj pri tio, ke en la urbo en 1937 ekzistis eĉ aliaj esperantistaj kluboj.

La plej glora ĉapitro en la historio de la klubo estas kunlaboro kun la radio Brno en la 30-aj jaroj, la t. n. **Verda Stacio**, kiu elsendis prelegojn, dramojn, operojn kaj operetojn kun gravaj artistoj (**Karel Höger**, **František Kožík**, **Jarmila Kurandová**, **Vladimír Leraus**, **Zdena Švábíková** k.a.) formintaj grupon TRAKT. Inter esperantistoj meritis pri la programoj **J.V. Šamla**, **Dalibor Chalupa**, **Theodor Kilian**, **M. Strejčková**, **Antonín Slavík**, **F. Bad'ura**.

Dua grava ĉapitro en la klubaj historio estas la literaturaj aktivecoj. Tradukojn de gravaj verkoj postlasis **Rudolf Fridrich** (*Benedek*), **Vincenc Kroužil** (*Ĉeĥa literaturo el birdperspektivo*), **J. Blahoslav** (*Moravia Karsto*), **J. Bednář** (*Barono Mensogbabilulo*), **J. V. Šamla** (*Sur rozoj sternite, Forta karaktero, Forlasita*). Eldonejon de Malkaraj Libroj fondis **Aleš Berka**. Poemojn verkis **Milda Jakubcová** (*Estrado de animaloj*). Fakajn verkojn prilaboris **Jan Werner** (*Terminologia kurso, Matematika vortaro Esperanta-ĉeĥa-germana*).

Sed plej grandaj literaturaj personoj de la klubo estis **Jiří Kořínek**, loĝinta en Brno 1931-1964, kaj **Josef Vondroušek**. Kořínek estas konata pro siaj nealkuleblaj poeziaj tradukoj (*Panjo, Manon Lescaut, Jakobeno, Flugilhava ŝtono, Sileziaj kantoj*). Josef Vondroušek pro tradukoj prozaj (*Libro de Apokrifoj, Poŝrakontoj, Milito kontraŭ Salamandroj, Propra biografio de Karolo IV, Aŭdienco, Ondro kaj drako*). Vondroušek preskaŭ duonjarcenton estis sekretario kaj prezidanto de la klubo. Liamerite la klubaj kunvenoj havis ĉiam programon de iu el la klubanoj (la tradicion konserveras la klubanoj ĝis nun). Li ankaŭ invitadis al la klubejo artistojn por prezenti esperantlingvajn koncertojn. Kelkaj estis mem esperantistoj (**Vilibald Scheiber, Věra Borská**), aliaj nur amikoj (**Václav Halíř, Helena Supová-Halířová, Radek Chudoba** k.a.). Deklamajn programojn preparis aktorino **Alena Růžicková-Pavlinová**, fakajn prelegojn doc. **Jaromír Šikula**.

## KONCIZE EL LA MONDO

\* **La revuo "El Popola Ĉinio"** daŭre estas produktata por reta eldono. Ĝi estas legebla ĉe: <http://www.espero.com.cn> aŭ [www.chinareport.com.cn](http://www.chinareport.com.cn)

\* **Memorlibro pri Ivo Lapenna**, la arkitekto kaj konstruinto de la moderna UEA, aperis antaŭ UK en Zagrebo (45 eŭroj).

\* **Beatigo de prelato J. M. Schleyer**. En junio 2001 s-ro Bernhard Eichkorn, sacerdote de la diocezo Freiburg (D) proponis al lia Ekscelenco D-ro Oskar SAIER, Arkiepiskopo de Freiburg, la beatigon de du diocezaj pastroj: D-ro Max Josef METZGER (1887-1944), ekzekutita fare de la nazioj, kaj prelato Johann Martin SCHLEYER (1831-1912), aŭtoro de volapuko.

\* **Sŭahila vortaro**. Mi estas redaktanta grandan retan Esperanto-Sŭahilan Vortaron. Kiuj povas/volas kunlabori, bonvolu kontakti min aŭ simple trafoliumi ĝin ĉe

<http://kamusi.vessella.net>

kaj sendi al mi komentojn. Nino

\* **La Libroservo de UEA** registris sian plej bonan jarmezan rezulton de la lastaj jaroj. Je la 30-a de junio la sumo de la vendoj estis 46 675 eŭroj. En la periodo ekde 1995 la vendosumo de la unua jarduono variis inter 37 378 kaj 46 250 eŭroj (resp. en 1995 kaj 1999). Oni kalkulas, ke en la dua duono de la jaro la ĵus aperinta katalogo plu akcelos la vendojn kaj ke la libroservo en la UK en Zagrebo vendos pli ol tiu en Tel-Avivo. Sekve eblas prognozi, ke la tuta ĉi-jara rezulto superos tiun de 2000.

## 90 jaroj de Esperanto en Poděbrady

La preskaŭ 80-jara Fiala prezentis al la partoprenantoj veran frandaĵon. Kvankam loka Esperanto-grupo ne plu vivas, tamen Fiala sukcesis arigi proksimume 40 partumantojn. Plej alte mi taksas la akcepton en la urbodomo. La vicurbestro akceptis nin kaj petis pardonon, ĉar la urbestro pro ferioj ne povas ĉeesti. Surprize audiĝis voĉo ĉe la salonpordo: "Tamen mi alvenis".

Ĉe la pordo staris viro en liber-tempaj vestaĵoj, klarigis, ke li nune renovigas sian domon, sed tamen por momento volas esti inter ni. Estis la urbestro, kiu evidente ne povis ne alveni. Tre belan impreson donis la Esperanto-grupo el urbo Siedlce (Pollando), kiu en uniform-similaj vestaĵoj buntigis nian renkontiĝon kaj vekis la atenton de la ceteraj urbanoj.

Pliaj brilaj punktoj estis la koncerto en la Husana preĝejo, kie kantis Miroslav SMYČKA kaj Kateřina KUDLÍKOVÁ (soprano). Dum pli ol unu horo ili alterne prezentis kantojn ekskluzive en Esperanto. Mi nur volas nomi 2 elstarajn prezentaĵojn: Zamenhofa

"Preĝo sub verda standardo" kortuŝe donita de SMYČKA, kaj "Kanto de l' Ligo" laŭ muziko de Mozart prezentita de ambaŭ gekantistoj en dueto.

Sed ankaŭ tre plaĉis la teatra post-tagmezo en la urba kastelo, kie la samaj geartistoj prezentis diversajn ariojn. Tiufoje: "Preskaŭ ĉiuj tekstoj en Esperanto".

Sed ankaŭ la amuzo ne forgesiĝis: Interkona vespero kun dancado. Ŝipveturado sur la rivero Elbo. Kamaradeca kunestado sur la kastela teraso. Fiala persone agis kiel piroteknikisto kaj prezentis piroteknikan lumludon.

En la loka muzeo montriĝis ekspozicio pri la esperantista vivo en la urbo. Krome estis preparita la senvaligo de 2 memortabuloj pri eventoj kiuj okazis en Poděbrady.

La adiaŭo okazis en la loka kampadejo. La lasta gaja afero estis la vetmanĝado de 4 kuraĝuloj, kies celo estis per la dentoj kapti valoran moneron en la kukomezo.

Menciindaj estus ankoraŭ pliaj eventoj: La promenado tra la "Aleo Esperanto", la koncerto en la banurba parko, kie la enloĝantaro kaj multaj banurbaj gastoj povis renkontiĝi kun vivanta Esperanto.

*S. Schlumberger*

## Ekspozicio kun konkurso de infandeseĝnaĵoj el la tuta mondo

Okaze de la unua Tago de Infanoj en la tria jarmilo kaj Eŭropa Jaro de la Lingvoj preparas Esperanta rondeto ĉe Urba Kulturcentro en urbo Vyškov (CZ) ekspozicion de infandeseĝnaĵoj el la tuta mondo kunligitan kun konkurso (la 23-a ĝis la 31-a de marto 2002). Temo de la deseĝnaĵoj estas MIA HEJMO. Povas temi pri via familio, loĝloko, urbo aŭ vilaĝo, en kiu vi vivas, kaj ĝia ĉirkaŭaĵo, regiono aŭ via lando. Estos tri aĝo-kategorioj: ĝis 8 jaroj, 8-14 kaj 14-18 jaroj. Dorsflanke skribu vian nomon, naskiĝdaton, adreson kaj nomon de la deseĝnaĵo. Rekomendinda estas partopreno de infanoj el klasoj de Kvazaŭlernejo de Tibor Sekelj. Deseĝnaĵojn prijuĝos vizitantoj de la ekspozicio, aparte infanoj kaj plenkreskuloj kaj faka jurio. Ĉiu partoprenanto ricevos memor-diplomon, la aŭtoroj de la plej bonaj tri verkoj en ĉiu kategorio premion. Formato de la deseĝnaĵoj ne estas limigita. Konkursaĵojn sendu (pli grandajn formatojn prefere ruligitajn) tiel, ke ili venu ĝis la 15-a de marto 2002 al la adreso: Esperanto-rondeto, MKS, Jana Šoupala 4, CZ-682 01 Vyškov.

*Nota: Mallongigo MKS signifas Urba Kulturcentro. Kontakto perreta por eventualaj demandoj: vojacek@jumbo.ped.muni.cz*



## La 19a Ĉeĥa-Saksa Tago en Pirna sukcesis!

La E-grupo "Saksa Svisio" en Pirna kune kun E-klubo en Ústí n. L. aranĝas alterne sur la ĉeĥa kaj la germana flanko tiel nomatan Ĉeĥan-Saksan Tagon (ĈESAT). La komuna translima kunlaboro komenciĝis jam en la 20-aj jaroj de la pasinta jarcento kaj oficialiĝis fine de la 70-aj jaroj. La tradicio de ĈESAT estis fondita iom pli poste.

La jam 19-a okazis sabate la 9-an de junio 2001. Partoprenis ĝin kvin ĉeĥaj kaj dek enlandaj geesperantistoj. El la bunta programo oni povas nomi precipe viziton de memorejo Sonnenstein, kie dum la nazia tempo nazianoj mortigis milojn da handikapuloj. Laŭ la nazia teorio handikapuloj multnombriĝas pli rapide ol la sana populacio kaj tial oni devis ilin forigi. Ni kliniĝis memore al la mortigitoj kaj metis tie verdan kronplekton.

Poste jam sekvis nur gajaj programeroj - post la tagmanĝo en Pirna-Copitz, ni revenis per pramo al la maldekstra bordo de Elbo en Pirna kaj per luksa ŝipo "Aŭgust der Starke" ni daŭrigis al 9 km distanca kastelo en Pillnitz (ĉk. meze de Pirna kaj Dresden). En belega kastela parko ni povis konatiĝi kun historio de la kastelo kaj admiris tre interesajn dendrologiajn raraĵojn. Dum la aranĝo estis sufiĉe da tempo neformale diskuti. Dank' al suna vetero ni revenis per buse al Pirna nur antaŭvespere kaj adiaŭis kun slogano: Ĝis la revido en Ústí n. L. la 8an de decembro 2001 okaze de la 20-a ĈESAT!

*Josef Kříž*

## PAROLIGA KURSO

okazos inter 30. 11. - 2. 12. 2001 en Olomouc. Kun konversaciaj kursoj por komencantoj kaj progresintoj. Aliĝojn akceptas Mgr. Jana Melichárková, Polní 936, 696 02 Ratíškovice.  
melicharkova@quick.cz

## Výzva ke spolupráci

Všem funkcionářům sekcí, klubů a kroužků Českého esperantského svazu

Podle stavu k 1. srpnu 2001 má svaz 831 členů. Z toho je největší počet doživotních členů (370) a dále zaplatilo 109 členů v kat. A, 265 v kat. B, 43 v kat. D a 44 členů v kat. E.

Vzhledem k tomu, že tato členská základna nezaručuje dostatečné příjmy, potřebné pro chod svazu a především pro vydávání časopisu Starto, rozhodl výbor svazu zvýšit členské příspěvky na rok 2002 takto: Kat. A - 250,- Kč, B - 150,- Kč, D a E - 70 Kč a kat. F - doživotní - 5000 Kč.

Není dost dobře možné akceptovat stav, kdy ještě v srpnu nemá mnoho členů zaplacenou na tento rok!!! Žádáme Vás, abyste výběr členských příspěvků na rok 2002 urychlili a odvedli je na účet svazu ještě letos. Jedině tak si zajistíte pro svůj klub nebo kroužek podíl 10% z odvedené částky!!

Znovu upozorňujeme, že těchto 10% si mohou odečíst pouze kluby nebo kroužky, mající právní subjektivitu. Ostatním bude tato částka připsána na

jejich subkonto u svazu. Při platbě po 1. lednu 2002 již nárok na 10% **nemáte!!!**

Současně Vás žádáme o získávání nových členů a obnovování členství u dřívějších členů (není nutné doplácet minulá léta ani platit znovu zápisné - bude ponechána původní legitimace).

Na aktivní spolupráci se těší  
Výbor svazu

Pavel Polnický  
cea.polnický@quick.cz

## Abonoj de gazetoj

Vladislav Hasala, A. Dvořáka 1, 696 62 Strážnice, tel. 0631/332 278, fakso 0631/332 507, elektronika pošto: vlada\_hasala@iol.cz

*Amikeca Reto (FR, 105 Kč), Esperantisto Slovaka (SK, 200), Eventoj (HU, 668), Heroldo (CH, 540), Informilo de AEH (CZ, 100), Interligilo de IPETA (BG, 110), Juna Amiko (HU, 130), Komencanto (RU, 409), Kosmos (DK, 204), La Gazeto (FR, 550), La Kancerkliniko (FR, 443), La merkato de IKEF (BE, 376), La Migranto (NL, 90), La Ondo de Esperanto (RU, 542), La Verda Lupeo de ELF (DE, 392), Literatura Foiro (CH, 505), Litova Stelo (LT, 362), Monato (BE, 561), La Jaro (BE, 164), Monda Solidareco (FR, 171), Ondo da Vero (TG, 555), Oomoto (JP, 250), OSIEK (135), Penseo (CN, libervola), RET-Info (HU, 429), Scienco kaj kulturo (RU, 455), Sennaciulo de SAT (FR, 530).*

## Detlev Blanke 60-jara

La fama germana lingvisto, kiu doktoriĝis en 1976 ĉe Humboldt-Universitato Berlino per disertacio pri Esperanto, kontribuis al scienca agnosko de interlingvistiko per multaj laboroj, redaktis dum multaj jaroj gazeton *der esperantist* kaj gvidis la movadon en la iama GDR, naskiĝis la 30-an de majo 1941.

Okaze de lia vivjubileo aperis festlibro

**Studoj pri interlingvistiko. Studien zur interlinguistik. Festlibro por / Festschrift für Detlev Blanke. Red. Sabine Fiedler / Liu Haitao, eld. KAVA-PECH, Dobřichovice 2001, 736 p.**

Post enkonduko de la redaktintoj pri la vivo kaj verkaro de la jubileulo (en E-o kaj en la germana) sekvas 43 artikoloj de diversaj aŭtoroj el 19 nacioj pri lingvistikaj temoj, dividitaj en kvar grupojn: *I. Lingvoplanado kaj lingvopolitiko, II. Studoj pri teoriaj, historiaj kaj aplikaj aspektoj de interlingvistiko, III. Esperantologio, IV. Terminologi-sciencaj kaj leksikografiaj aspektoj.* Inter la artikoloj 15 estas germanaj, sed antaŭ ĉiu la leganto trovos resumon en Esperanto, simile antaŭ la Esperantaj troviĝas resumo germana. Kaj ĉiam sekvas ankaŭ resumo angla. Ĉar la libro estas donaco al Detlev Blanke, neniu el la artikoloj estas de li mem.

La unua bloko priskribas la lingvajn problemojn en Eŭropo el vidpunktoj de praktiko, homaj rajtoj kaj tutmondiĝo (intencaj intervenoj en lingvouzon, artefarita kaj natura en la rumana, la

greka kiel internacia, tekniko en la sveda, defio de Eŭropo kontraŭ Usono).

La dua bloko estas dediĉita al lingvoplanado kaj interlingvistiko ĝenerale, do ankaŭ al Ido, Volapuko, Kosmopolit, kaj ne evitas ankaŭ scienc-fikian literaturon, interreton, informadikon..

La tria bloko, la plej ampleksa, estas dediĉita al temoj pri Esperanto mem - el vidpunkto lingvistika (nazaloj, fonemoj, liter-ofteco, infinitivo, aziaj elementoj en Esperanto, Esperanto-elementoj en Okcidentalo), movada (ĉu perdita komunumo?, René de Saussure, politika aktualeco en lernolibroj) kaj literatura (tradukado de bibliaj tekstoj, estetika funkcio en Esperanto).

La lasta parto priskribas terminologiajn kaj leksikografiajn problemojn, donas ekzemplojn el la fervoja kaj forsta fakoj kaj matematiko (grandaj nombroj).

Fine de la libro trovos la leganto medalionojn de la aŭtoroj (ekz. Tonkin, Mattos, Krause, Barandovská, Kuznecov, Bormann k.a.) kaj la supervidon pri la verkaro de Detlev Blanke.

Temas pri verkaro vere impona. Unue libroj germanlingvaj (Planlingvoj kaj naciaj lingvoj, Esperanto kaj scienco, Internaciaj planlingvoj, Historio de Esperanto en GDR, Konversacio Germana-Esperanta), poste redaktadoj (*der esperantist*, Paco, Informilo por interlingvistoj), tradukoj (W. Reischock: *Klereco por hodiaŭ kaj morgaŭ*, K. Marx - F. Engels: *Manifesto de la Komunista Partio*) kaj pli ol 500 artikoloj aperintaj en gazetaro (aranĝitaj laŭ la jaroj).

Miroslav Malovec

## Harakuni en Havířov

En la 2-a numero de Starto vi legis mian artikolon "Preskaŭ nevidantino petas vian helpon." Estas tre laŭdinde, ke skribis aŭ telefonis al mi kelkaj geesperantistoj, kiuj volis helpi al Jindra Rotterová (Gwozdŕová). Tial mi tre dankas al gesamideanoj Rýznarová el Pardubice, Bradová el Havířov, Červenka el Otrokovice kaj Rob Moerbeek el Nederlando. Ili ĉiuj proponis, kiamaniere helpi al Jindra.

Kaj kiel reagis s-ano inĝ. Harakuni EGAWA el Japanio? La 1-an de julio 2001 li alflugis eĉ kun sia edzino Kimie al Praha, kie atendis lin s-aninoj Jindra Drahotová el Mladá Boleslav kaj Maruška Bímová el Praha. Interalie ili veturigis lin al Kongresa palaco por rigardi la memorŝtonon, kiu estis instalita honore al la kongreso de Esperanto en 1996.

La 5-an de julio 2001 ili sidigis lin en rapidvagonaron, per kiu li forveturis al Havířov. Estas tre laŭdinde, ke en ĉiuj fervojstacioj, kie la rapidvagonaro haltis, atendis lin kelkaj esperantistoj por saluti lin. S-anino Eliška Kunertová el Lanškroun, kiu ne povis veni al la vagonaro, sendis al Harakuni bildkarton de Lanškroun kun salutvortoj. S-ano Láďa Fiala el Poděbrady akompanis lin dumvoje el Praha al Kolín. Sed la plej oferema estis Sváťa Čech el Česká Třebová, kiu akompanis geedzojn EGAWA el Česká Třebová ĝis Havířov. En Ostrava-Vítkovice atendis ilin tri esperantistinoj, kiujn gvidis s-anino Klegová, prezidantino de EK Ostrava-Poruba. Ilia oferemo estas rimar-

kinda, ĉar kvankam ili estis malsanaj handicapulinoj, ili traveturis tutan Poruba, Ostrava kaj Vítkovice, por ke ili povu saluti Harakuni.

En Havířov estis atendita Harakuni de ilia "amata Jindra" kun filo Ivo kaj de mi kun mia edzino. Nekredeble estas, ke post preskaŭ 50 jaroj renkontiĝis Jindra kun Harakuni. La renkontiĝo estis rava, ĉarma, sortoplena kaj fascina.

Plua neforgesebla travivaĵo por Harakuni estis vizito de Oswiecim, kien mi veturigis lin per mia aŭtomobilo. Mi dankas al s-ano inĝ. Zdislaw Glajcar el pola urbo Cieszyn, kiu navigis nin kaj poste gvidis tra Oswiecim. Ĉarma estis ankaŭ renkontiĝo kun polaj gesamideanoj en urbo Bielsko-Biala.

Same la renkontiĝo de geesperantistoj en Havířov estas neforgesebla. Dum la renkontiĝo interalie s-ano Harakuni kaj lia edzino kantis al ni originajn japanajn kantojn kaj li dancis al ni originan japanan dancon. La renkontiĝon partoprenis 30 geesperantistoj el Havířov, Ostrava-Vítkovice, Ostrava-Poruba kaj Opava. Ĉeestis ankaŭ la prezidanto de Pola Esperanto-Asocio s-ano Mandrak el Gliwice. S-ano Jan Matyáš el Havířov estis perfekta organizanto de la renkontiĝo kaj liamerite estis la renkontiĝo eminenta.

S-ano Harakuni estis nia gasto de la 5-a ĝis la 9-a de julio 2001. Poste li forveturis kun sia edzino al Vieno, Budapeŝto, Salzburg kaj fine de julio forflugis hejmen al Japanio.

*Oldřich Schwetter, Havířov*

## Somere lumegas la liĥnidoj...

Liĥnido estas genro tre bone konata al nialandaj florigarden-ŝatantoj. Ties latina nomo *Lychnis* devenas el la greka *lychnos* = lampo, lanterno aŭ ĝenerale lumilo. Jes ja, temas pri floroj brilkolore lumantaj. Trafe impresas la nomo germana: *Lichtnelke*. Bedaŭre, en PIV troviĝas la misformo "liknido", kiun senkritike adoptis Esperanto-vortaroj, i.a. la freŝdata de Kraft (1998). Nome, la francoj prononcas sian *lychnide* kun K. Tamen, mankas ajna motivo, por ke la Zamenhofa lingvo kaĵolu al franceska aŭ angleska fonetiko. Unue, la kreinto de Esperanto celkonscie distingadis inter la du grekaj fonemoj *kappa* kaj *kĥi*. Due, ĉi-okaze la greka *liknon* signifas vekton aŭ pesilon, do ne kapablas elvoki la semantemon de lampo. Krom diskriminacio de la lingvo, grava ĝuste por la scienca leksiko, oni evitu konfuzojn tute superflujajn, ĉu ne vere?

En ĝardenoj oni renkontiĝas kun jenaj specioj:

1. **liĥnido halcedonia** (*Lychnis chalcedonica*), nomita laŭ la malgrandazia regiono, sed fakte devenanta el iom pli nordaj teritorioj ĉirkaŭ Nigra kaj Kaspia maroj. Pro la fajrece ruĝaj floroj ĝi ricevis la popolan nomon "brulanta amo" (ĉeĥe "hořící láska").
2. **liĥnido koronaria** (*Lychnis coronaria*), kvankam leksike referencanta al la sang-arterioj, floras ne tiom

"varmege", ĉar ruĝviole. La latina adjektivo *coronarius* signifas simple "florkrona". La planto hejmas en Irano, Turkeŝtano kaj suda Eŭropo, sed progresas ĝis Slovakio. Kiel ofta ĝardenomamaĵo ĝi liveras belan kontraston de la floroj kun la foliaro kaj tigo arĝent-lanece tegitaj.

3. **liĥnido floro jova** (*Lychnis flos-jovis*) devenas el Centraj Alpoj. Laŭkolore la floroj similas al tiuj de la specio antaŭa, sed ili restas bulforme kunpremitaj. En nialandaj ĝardenoj ĉi tiu specio estas kultivata malpli ofte.

4. **liĥnido floro kukula** (*Lychnis flos-cuculi*), la ĉarma herbeja planto ornamas ne nur nian landon, sed la tutan Eŭropon, Siberion, Islandon, eĉ Nordan Amerikon. La malhele rozkoloraj petaloj aspektas gracile, estante profunde plurlobaj. Spite al la fundamenteco de "kukolo", taŭga kiel popola nomo de la birdo *Cuculus canorus* (familio *Cuculidae*, ordo *Cuculiformes*), en Esperanto nomenklature pli rekomendinda formo por la genro estas **kukulo**, por la familio **kukuledoj**, por la ordo **kukuloformaj**. La scienca lingvo havas ja sian pli striktan regularon ol la komunuza. Jen, kiel nin la liĥnido kondukis al ornitologio...

J. Kavka

**liĥnido bot.** kohoutek (1. *chalcedonský*, 2. *věncový*, 3. *Jovišův*, 4. *luční*)



## 49-a Somera Esperanta Tendaro Lančov

Nunjare okazis jam la 49-a Somera Esperanta Tendaro en Lančov. Entute partoprenis ĉirkaŭ 220 da partoprenintoj, plejparte infanoj, kiuj lernis ĉefe anglan lingvon, poste germanan kaj ankaŭ francan. Esperantan kurson bedaŭrinde vizitis nur kelkaj unuopuloj. De post jaro 1992 la nombro de esperantistoj malgrandiĝis. La intereso pri Esperanto inter infanoj ne estas tre granda kaj plenkreskuloj preferas vojaĝi eksterlanden. Tamen la tendaro vivas kaj ĉiuj organizantoj kredas, ke Esperanto al la tendaro revenos. Eksterlandaj partoprenintoj estis el Slovakio, Germanio, Francio.

Krom la jam menciitaj lingvoj nunjare la unuan fojon dum la 3-a etapo okazis kurso por vidarta edukado. Kvankam aliĝis nur kelkaj infanoj, la intereso de multaj ceteraj kreskis kaj post instruado de lingvoj ili dediciis al pentrado kaj similaj praktikoj. La kurson gvidis profesia instruistino s-ino Vlad'ka Deáková el Teplice. Sub ŝia gvido kursanoj pentris diversajn bildojn, la modeloj estis naturaĵoj. Tre interesaj kaj belegaj estis bele ornamitaj diversaj ŝtonoj, kiujn infanoj unue serĉis en proksima ĉirkaŭaĵo kaj ĉe la rivereto. La ŝtonoj prezentis diversajn figurojn! ekzemple leporojn, fiŝojn, papiliojn, florojn, diversajn abstraktaĵojn ktp. Fine de la 3-a etapo okazis ekspozicio de ĉiuj "artistoj", kiu estis tre bela kaj vere arta. En venontaj jaroj certe la intereso

pligrandiĝos kaj tiuj ĉi kursoj okazos ankaŭ dum aliaj etapo kompreneble sub gvido de profesiuloj, eĉ famaj pentristoj. Helpon promesis ankaŭ pentristo Josef Kremláček el Třebíč.

Interesa estis ankaŭ renkonto de eksaj tendaranoj, kiuj alvenis jam 4-an fojon por rememori la tempojn, kiujn ili travivis en la tendaro. Pli ol 50 partoprenintoj ĝuis la tendaran etoson ĉe tendarfajro kaj ĉe fotografiaĵoj de estintaj tendaroj. Multaj el ili renkontis sin post dek, eĉ pli da jaroj. Ĉiuj partoprenintoj forlasis la tendaron decidiĝintaj venontan jaron denove alveturi.

En la jaro 2002 okazos jubileo, jam la 50-a tendaro. Ni ĉiuj esperantistoj havu taskon, redoni Esperanton en la tendaron. Estus bone, se Esperanto, kiu multajn jarojn regis ĉi tie, estu almenaŭ serioza konkurenco kontraŭ aliaj lingvoj. La organizantoj, EK Třebíč, atendas helpon en tiu afero de ĉiuj kluboj kaj rondetoj kaj ankaŭ de unuopuloj. Tio estus plej bona donaco al 50-a jubileo de Somera Esperanto-Tendaro.

*Věra Podhradská*

## Kurso por instruistoj

Ing. Josef Vojáček, nome de la pedagogia fakultato de Masaryk-universitato en Brno, dissendis al 800 lernejoj en Ĉeĥio proponon de Esperanto-kurso "Mazi en Gondo-lando", kiel kurson por instruistoj, kiuj dezirus poste instrui la lingvon al infanoj. La propono estas interesa eksperimento, kies rezultojn ni devos ankoraŭ kelkajn monatojn atendi.

## AMIKON MONTRAS MALFELIĈO

Ĉijare mi partoprenis la XXIIIan Ĉebaltan Esperantistan Printempon en Mielno (Pollando). Organizanto estis s-ano Ĉeslaw Baranowski, kiu sian taskon faris kaj preparis bonege. En Mielno en hotelo Sport loĝis pli ol 70 partoprenantoj el 16 landoj. La sporta hotelo estis bele ornamita per Esperantaj devizoj kun belaj motoj. Unu domo estis ornamita per ŝtataj flagoj de partoprenantoj. La programo estis tre riĉa kaj interesa. La prelegoj tre variis. Ekzemple la francan vesperon preparis geedzoj Chibleur, pri la 85-a UK en Tel-Avivo raportis Gunter Ebert, pri planoj de Monda Turismo parolis prezidanto Andrzej Grzębowski, pri kantado zorgis s-ino Ula Giercarz, en la ĉeĥa vespero venis ankaŭ sorĉisto Rýznar, dum dancado prezentis sin dancmajstra paro, adiaŭa vespero kolektis nin ĉirkaŭ bivakfajro kun rostado de kolbasetoj. Unuvörte, belegaj tagoj.

Nun pri momentoj ne tiel belaj. Kiam mi volis veturi hejmen, mi envagoniĝis en Koszalin, sed tiel malfeliĉe, ke mia piedo glitis el ŝtupo, mi falis sub vagonon kaj la

ŝtupo vundis mian oston de genuo kaj muskolojn. Mia amiko s-ano Marian Łaba, kiu akompanis min, tuj helpis al mi sur la kajon, kun fervojistino vokis ambulancan aŭtomobilon kaj kunportis min al hospitalo.

En la hospitalo oni decidis operacii la genuon. Post la operacio gipso fermis mian tutan gambon. Nun mi povis taksi, kion signifas amikeco. D-ro Marian Łaba zorgis pri ĉio grava, ĉiutage vizitadis min kaj provizadis per fruktoj kaj trinkaĵoj. Plie min vizitis s-anoj Baranowski kaj Nowakowski kun edzino kaj filino. En eksterlando mi eksentis, kion signifas amikeco de esperantistoj kaj kiel pravas la proverbo, ke la malfeliĉo montras amikon.

Ludvík Chytil



## La 37-a BET en Kaunas

▲ Tradiciaj Baltaj Esperanto-Tagoj, ĉi-jare en litova urbo Kaunas, okazis ekde la 6-a ĝis la 15-a de julio 2001. Entute 301 partoprenantoj el 18 landoj venis en la belan urbon Kaunas por studi, praktiki kaj perfektigi sian lingvoscion. La belega trankvila universitata urbeto bonvenigis nin. La programo estis alloga kaj bunta. Ni povis lerni la lingvon en la kursoj por komencantoj, perfektigan kaj paroligan kurson gvidis fama verkisto kaj tradukisto Trevor Steele el Aŭstralio. Prelegoj en somera universitato estis variaj. La prelegon, kiun mi preparis pri Ĉeĥio kaj E-movado ĉe ni partoprenis deko da interesatoj. Mi kun miaj geamikoj respondis ĉiujn demandojn, sed ŝokis nin malĝusta informo de iu germana esperantistino, laŭ kiu ĉe ni aperas neniu E-gazeto. Ŝi ricevis eĉ kelkajn. Ni vidis filmojn en Esperanto, ni povis eklerni danci kaj spekti multajn vesperajn programojn en alta nivelo. Por infanoj kaj junularo okazis aparta programo. Ni povis ĝui senpagan ekskurson al malnova parto de la urbo kaj al monaĥejo. La tuttaga ekskurso, kiu okazis merkrede, celis al suda Litovio, kie muĝas la plej grandaj pinarboj kaj fluas ĉarmaj riveroj, inter ili ankaŭ

Nemunas. Dum la ekskurso ni vizitis unikan parkon de sovetaj skulptaĵoj (renversitaj idoloj). Kvankam mi komence ne volis partopreni la ekskurson, mi ĝin partoprenis kaj mi ekvidis veran historion en unu loko. Mi povis eksenti etoson de la koncentrejoj "Gulag". En kuracloko Druskininkai ni enŝipiĝis kaj ŝipveturis laŭ la rivero Nemunas. En Likiaiva ni elŝipiĝis, surgrimpis kastelmonteton, kie ni vizitis la plej belan barokan preĝejon en Litovio. Poste la buso veturigis nin al eta vilaĝeto Veisiejai, kie loĝis L. L. Zamenhof kaj kie okazis antaŭ tri jaroj BET. En tiu ĉi malgranda vilaĝeto troviĝas du monumentoj de Zamenhof. Post bongusta tagmanĝo ni revenis al Kaunas.

Tamen kelkaj programoj estis lastmomente translokigitaj aŭ nuligitaj, pri kio ni eksciis nur veninte surloken.

Ekspozicioj, ĉambro kun krokodiloj, eĉ unu viva, kaj ĉiutage alia ekspozicio de partoprenantoj pri ĉiutaga vivo en E-klubo, donacetoj kaj aliaj tre plaĉis al ni.

Meznokta piroteknika artfajraĵo finis kaj kronis nian renkontiĝon.

*L. Filipová*

## Lingvaj ludoj kaj enigmoj

(7)

Solvo de la dusencaĵoj el la antaŭa numero:

11. vi divenu, vidi venu

12. tropika, tro pika

Kelkaj vortoj aŭ kelkvortaj esprimoj legitaj de la fino al la komenco donas novan sencplenan esprimon. Tiu ĉi fenomeno estas bazo por la enigmo, kiun ni povas nomi

### RETROLEGO

Trovi tiujn vortojn kaj esprimojn ne estas tro facile, sed tamen ili ekzistas kaj ili estas proponblaj al divenantoj. Ambaŭ tekstoj, t.e. legita normale kaj retrolegita, estas en propono anstataŭitaj per difinoj, sinonimoj aŭ preskaŭ-sinonimoj.

Jen kelkaj ekzemploj:

Tragikon ĉe la hom' atestas,  
se la **sentorgan'** kiel **stoneg'** estas  
Solvo: kor', rok'

En la **song'** sin droni  
estas tre agrable,  
sed la **prav'** nin vekas  
el ĝi malafable.

Solvo: rev', ver'

Dum promen' ĉe la rivero  
mi ĉe **borda konstruaj'** renkontis  
dandon, kiu dum somero

en la **moderna vestaj'** sin montris.  
Solvo: kaja dom', moda jak'

Taskaj retrolegoj:

13. Deponi monon en MONEJ'  
Ne povas dekjara JUNUL'.

14. La **tuto da famoj**  
ĉe la publiko,  
jen **valora heler'**  
en politiko.

*Josef Cink*

## Ĉeĥa Radio Vltava propagandis Esperanton

En la pasinta Starto 2/2001 mi informis pri la opero Najado de Antonín Dvořák en Esperanto, eldonita de blindula asocio kiel kompleto de du kazodoj. Kia estis mia surprizo, kiam rete venis informo, ke la Ĉeĥa Radio, stacio Vltava, elsendos sabate la 11-an de aŭgusto 2001 je la 20-a horo la Esperantan version de Najado. Eble la motivo estis, ke tiel konserviĝis la sola Najado de Marie Tauberová, kiu neniam kantis ŝin en teatro. La esperantlingva komentario de Karel Höger estis anstataŭigita per ĉeĥlingva komentario de d-ro Jan Králík, kiu tre impresse kaj favore parolis pri la celoj de Esperanto kaj pri la estiĝo de la registraĵo. En 1948 oni registris ĝin sur filmo sen bildoj, poste en 1956 oni transigis ĝin sur magnetofonan bendon kaj en 1994 en diĝitan formon. Post konciza bibliografio de Tomáš Pumpr oni elsendis la ariojn.

**KALENDARO 2001**

2.-5.9.	Antaŭ-IBIRE en Dobřichovice (por biciklistoj)
5.-9.9.	IBIRE en Doksy (Internacia Biciklista
Renkontiĝo)	
28.-30.9.	Kultura Festivalo en Ústí n. L.
10.-14.10.	Klerigaj tagoj Jetřichovice
19.-21.10.	8-a konferenco de ĈEA en Poděbrady
oktobro	Aŭtuna semajno en Skokovy
30.11.-2.12.	Paroliga kurso, Olomouc
8.12.	Ĉeĥa-Saksa tago
decembro	E- Silvestro en Ĉ. Třebová

**Jak platit svazu**

Nejlevnější způsob platby pro Vás i pro svaz je přímá platba u pokladny v kterékoliv pobočce Komerční banky. Vyplníte pokladní složenku (jsou v pokladně k dispozici) pečlivě ve všech kolonkách - tedy: měna účtu: Kč, č. účtu: 3330-021/0100, měna hotovosti: Kč, částka: slovy kolik platíte, jméno a příjmení, adresa. RČ (nemusí být). Pokud platíte za kroužek (klub, sekci), vyplňte stručně EK (sekce železn.) a místo do kolonky - vklad jménem. Velmi důležitý je pro určení platby variabilní symbol - číslo (5-místné), které je buď stálé (viz seznam) nebo bude vždy uvedeno na pozvánkách nebo na inf. článku ve Startu. Konstantní symbol je vždy 0379. Seznam čísel:

06940 ĈES  
06941 UEA  
06942 předplatné Starta bez členství  
06943 dary ĈES

50100 sekce mládeže  
50200 sekce železničářů  
50400 sekce pedagogická  
50401 písemný kurs začátečníci  
50402 písemný kurs pokročilí  
50403 členství ILEI  
50500 sekce přátel SAT  
50600 sekce šachistů  
50700 sekce sběratelů  
50800 sekce nevidomých  
50900 sekce zdravotníků  
51000 sekce křesť. esp. KELI  
51100 sekce katol. esp. IKUE  
70100 komise pro tisk a inf.  
80200 ediční fond  
80300 propagace v tisku  
80400 fond Tilio

**Výzva:** Pokud jste poukázali platbu a nejste si jisti, zda jste řádně vyplnili své jméno, napište tajemníkovi svazu, kdy a kolik jste platili - máme více než 20 neurčených plateb, a to na různé akce, členství ĈES, ale i na členství UEA.

**Důležité sdělení:** vzhledem k výše uvedené změně platby NEBUDE svaz rozesílat složenky (děkujeme za pochopení).

**Roman Heřman,** delegito de UEA por Kosmonosy, anoncas numeron de sia poštefono: 0606 143 339

**Konference ĈES  
za dveřmi !  
19. - 21. října 2001  
Poděbrady**

**Periodikum Českého esperantského  
svazu (32. ročník)**

**Redaktor: Miroslav Malovec,  
Bosonožská 15/10, 625 00 Brno,  
starto@clavis.cz;  
www.clavis.cz/starto**

**Členská evidence a změny adres:  
Pavel Polnický, ČES**

**Presorgano de Ĉeĥa Esperanto-Asocio  
(32-a jarkolekto)**

**Abonebla ĉe UEA, ĉe niaj perantoj aŭ  
rekte ĉe nia Asocio**

**Abonprezo: 9 eŭroj  
(se aerpoŝte: + 2 eŭroj)**

**Redaktoro: Miroslav Malovec,  
Bosonožská 15/10, 625 00 Brno,  
Ĉeĥio, e-mail: starto@clavis.cz;  
www.clavis.cz/starto**

**Presis: OPATISK Opava**

**ISSN 1212-009X**

F259

MALOVEC MIROSLAV  
BOSONOŽSKÁ 15  
625 00 BRNO